Михаил Юрьевич Лермонтов,

# La velo

*tradukita de Konstantin Gusev*

Blankadas velo unusola
En la nebula mara blu'
Ĉi kion lasis, kion volas
En fremdaj landoj serĉi plu?

Ondiĝas kaj la vento spiras,
Fleksante l'maston kun fervor',
Ve! Ne feliĉon vel' aspiras,
Nek de l'feliĉo kuras for.

Ĝin kovras blua rond' ĉiela,
Sub ĝi lazuras onda spac',
Sed ŝtormon serĉas ĝi ribela,
Kvazaŭ en ŝtormoj estus pac'.

*Traduko de la Rusa poemo "Парус" de* Михаил Юрьевич Лермонтов *(*1814-10-16 – †1841-07-27) en Esperanton de* Konstantin Gusev *(†1980-11-09).*

*Arg-545-1095 (2010-06-20 17:39:30)*

*Tiun ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2010-06-20 de s-ro Yenovk Lazian, Leonhard-Hausmann-Str. 58, D-86157 Augsburg, Germanio. Pri K. Gusev (Константин Михайлович Гусев) vidu ankau la vikipedian paghon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Konstantin_Gusev`.

Михаил Юрьевич Лермонтов,

# Das Segel

*tradukita de Heinrich Greif*

Wo Meer und Himmel sich vereinen,
Erglänzt ein Segel, weiß und weit -
Was trieb es aus dem Land der Seinen?
Was sucht es in der Einsamkeit?

Es pfeift der Wind. Die Wellen drohen.
Es knarrt der Mast. Das Segel schwebt
Nicht vor dem Glück ist es geflohen.
Es ist nicht Glück, wonach es strebt.

Strahlt auch in Gold der Himmelsbogen,
Und glänzt auch noch so blau das Meer -
Das Segel lechzt nach Sturm und Wogen,
Als ob in Stürmen Ruhe wär.

*Traduko de la Rusa poemo "Парус" de* Михаил Юрьевич Лермонтов *(*1814-10-16 – †1841-07-27) en la Germanan de* Heinrich Greif *(*1907-03-11 – †1946-07-16).*

*Arg-545-1944 (2015-01-24 19:29:11)*

*Pri Heinrich Greif vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Greif`. *La traduko troviĝas en* `http://langadvice.blogspot.ru/2012/10/blog-post.html`.